

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten  
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Majo/Junio/Julio 1973

## Nia 25a - Jubilea kongreso



Generalprezidanto de FISAIC d-ro Schlessler donacis arĝentan medalon de FISAIC al Jons Kristoffersen



## Aarhus Ridetanta Revido kun la unua kongresurbo de IFEF

Guste tiuj, kiuj vojaĝis neniam Aarhus-on, iom skeptike antaŭjuĝis „jam trian fojon en Aarhus: 1., 10., 25., rutinel“ Probable ĝi estas nebula, fumplena fervoja nodo.“ La sabata vetero (kiel antaŭ 15 jaroj) ŝajnis pravigi tiajn supozojn. La kongresurbo ne tuj malkaŝis sian sloganan rideton. Tamen „Aarhus, la urbo de la rideto“ ne nepre signifas sunbrilan ĉielon, sed afablon kaj bonhumoron, sunbrilan internan medion kaj kompreneble homojn, kiuj konsistigas ĝin. Tion oni baldaŭ post alveno povis sperti. Kongreso sen urĝo kaj hasto, malgraŭ riĉa programpropono, efika laboro kaj altkvalita faka nivelo. Neimageble, ke eĉ nur unu inter la 502 kongresanoj el 18 landoj estus bedaŭrinta la vojaĝon al nia jubilea kongreso.

### Solene — festene

La 13an de Majo ducento komencis sian kongresan dimanĉon per ekumena diservo en nia lingvo, kiun malfermis ĝuinda frubaroka koncerto en la historia navo de la plej malnova preĝejo post la katedralo. Celebradon kaj predikon kadrumis la blovensemblo per muziko el la himnaro.

La inaŭgura ceremonio en la granda halo urbdoma vidis vicon de altrangaj reprezentantoj el komunumo, fervojoj, sindikatoj kaj Esperanto-movado. Ĉu pro la jubilea evento, ĉu pro dana gastameco, ĉu pro sincera agnosko pri nia aktivado kaj pozicioj de DEFA kaj IFEF tiom da kremo ornamis nian Solenan Malfermon?

La bankedo multajn kongresanojn, oficialulojn kaj honorajn gastojn arigis en la feste dekorita salonego de la kongresejo. Laŭdaj, promesaj, kortuŝaj paroloj solenis la horon. Generalprezidanto de FISAIC d-ro Schlessler ĉiam akcentas kaj videble praktikas sian simpation al la esperantista familio kaj ĝiaj altaj idealoj. IFEF-prezidanto Gießner responde vortumis, ke idealojn, kiujn ni ja neniam atingas, ni tamen bezonas por navigacii.

Menciendas la vere inda kunveno de la veteranoj. Ĝi restos en memoro de la meritpeza rondo. Ne ĉies konsenton trovis la kriterioj fiksitaĵoj por karakterizi veteranecon. Sed kiel prijuĝi motivigon, ĉu laŭ aĝo kaj aktiveco, ĉu laŭ kotizokvanto, rango, funkcioj, ĉu laŭ meritoj kaj laboremo, kiu scias justan procedon? Apartan honorigon ricevis Ingvard Kensing, kiu inter multegaj aliaj meritplenaj agadoj, jam tri fojojn (dufoje kiel LKK-prezidanto) aktivis en la kongresprepara komitato.

Mardon vespere la urbo gastigis la kongreson. Malavare la reprezentanto de Aarhus regalis ĉiujn kongresanojn per kukoj, dolĉa vino kaj bareloj da Danske Öl. Du horojn multvoĉa gajo abelare zumis tra la solenaj haloj.

### Fake

Du prelegoj, kvankam laŭteme mal-samaj, tamen esence kompletigis sin reciproke. Kiel sperta fakulo d-ro Werner Bormann, Hamburg, elokvente sciis kapti la intereson de pli ol 120 aŭskultantoj pri la tute aktuala „Eŭropa fervoja politiko en la Komuna Merkato“. Aparte interesa por la fervojistoj ŝajnis la analiza komparo de transportkostoj inter rela kaj strata trafiko. La prelego pro eble ne antaŭviditaj cirkonstancoj ne trovis konvenan lokon en la programo kaj en la kongresejo. Ampleksa rezumo aperos en IF n-ro 3/1973.

Kvankam nur lastan kongrestagon, tamen ĉ. 200 aŭskultantoj, nekonsiderante la tre tedan iron kaj venon, aŭdis pri temo specife dana, kies praktikon preskaŭ ĉiu kongresano povis sperti pli-malpli dumvojaĝe aŭ okaze de ekskursoj. La prelego „DSB kiel ŝipkompanio“ ne nur informis pri diversspeca pramtrafiko vivnecesa por danlanda ekonomio, por la ĉiutaga varinterŝanĝo transmara kaj por la skandinavia turismo, sed ĝi krome konigis aliajn transportajn kaj teknikajn evoluojn pri kontenertrafiko, transportigo de beltoj k. a. Filmoj kaj mapo, ilustraĵoj kaj statistikoj grafikaj klarigis ankaŭ al nefakuloj la problemojn, kiujn la Danaj Ŝtataj Fervojoj (DSB) de 100 jaroj sukcese priraktas. Merititan aplaŭdon la aŭtoro Gunnar Thuesen ricevis ne laste pro la trankvila, ekzakta kaj klare prononcita prezentado. Sekvan diskuton aktive partoprenis nur malgranda rondo, pro posta ekskursaranĝo; tamen restis interesa memoro, ke la DSB-ŝiptrafiko kiel sola fervoja branĉo laboras kun profito. Represon ni legos en IF n-ro 4/1973.

La varia programo proponis multon da fakaj vizitoj ne nur fervojaj: al vagonfabriko, al kooperativa entrepreno, en teknika lernejo kaj al moderna gazet-



entrepreno, ĉie kun afabla akcepto, malgranda regalo kaj abundo da interesaj sciindaĵoj.

### **Akurate**

Eniam tiel ofte, kiel en tiu ĉi kongreso oni aŭdis pri „interna disciplino“, kio celis akuratecon, korektan plenumon de libervole akceptitaj taskoj kaj ekzaktan traktadon de kongresdecidoj flanke de la asocioj eĉ mem konsentitaj. Kia revo, apliki tian akuraton ankaŭ dum la kongreso. Imagu ekzemple, ke ĉiuj landaj reprezentantoj en la kongresa inaŭguro limigus sian sendube necesan prezenton al konciza mesaĝo kun salutvortoj, certe ni povus atingi ankaŭ akurate la posttagmezan programon kaj ne bezonas trostreĉi la paciencon de la gastoj. Por pli ampleksaj raportoj la plenkunsido estas konvena forumo. Aŭ se estraranoj kaj komisionestroj nekonsidere malfruantojn akurate malfermus la kunsidojn, supozeble restus ankoraŭ sufiĉe da tempo por publikaj diskutoj, kiuj povus akceli la ĝeneralan intereson pri la multflanka organiza, faka, lingva kaj informa laboro de nia organizaĵo. Ankaŭ prelegantoj kaj iliaj interesitaj aŭskultantoj ne malŝatus akuratan publikon; prefere malpli laŭnombre, sed kun pli da respekto pri laboro, kiu ofte postulas multajn monatojn da preparado.

### **Labore**

Ampleksan laborprogramon la komitato flue pasigis. Publikaj kunsidoj havis eĉ eksterordinare bonan viziton. Japania landa osocio JELF kiel 20a estis akceptata en IFEF. La sekretariino, s-ino Kruse, kiu ankaŭ nodis la unuajn fadenojn, en Aŭgusto sekvas inviton al prelegvojaĝo en Japanio.

La fakaj komisionoj vidis nature malpli da publiko. La terminara komisiono elektis k-gon Sekereŝ kiel novan estron. La franca sekcio kun k-go Blondeaux decidis, plenumi dum la venontaj tri jaroj propran laborprogramon. Por la fakprelega laboro la komitato konfirmis la malnovan komisionestron, kiu kontinue daŭrigos sian agadon, almenaŭ ĝis la nova laŭstatuta labormetodo kontentige realiĝos.

### **Publike-publice**

Modele funkcia gazetara servo per kvin bultenoj ĉiam aktuale sciigis al la kongresanoj ĉiun gravajn kongresajn okazaĵojn. Ankaŭ la dana gazetaro havis regulan informadon kaj la Esperantoredakcioj ricevis resuman raporton. Pluraj

intervjuoj disvastigis faktojn kun granda intereso akceptitajn.

Flagoj, afiŝoj, tekstrubandoj, ekspozicioj en la kongresa banko kaj en vitrinoj de granda magazeno atentigis vastan publikon. La preparaj studoj por la fakprelego sekvigis neatenditan oficialigon kaj per tio ankaŭ subtenon materian kaj financan flanke de DSB.

### **Muze — amuze**

Vere ne mankis okazoj por renkonti malnovajn kantojn, por amikiĝi kun simpattiaj gekongresanoj kaj por amuziĝi per muziko kaj danco. Fakte ja la balo diferencigis de la interkona vespero, prefere nomata renkonta kunveno, nur per la pli festaj vestoj. Du dancvagonoj en la ekskurstrajno, same la dana tirola kapelo de la FISAIC-vespero provokis gajecon kaj dancemon.

Du folkloraj prezentoj vidigis dancojn de la danaj insuloj kaj aŭdigis eskiman muzikon. Filmoj, prelego kaj literaturo iom kompletigis la scion pri la granda dana teritorio Grenlando. Ankaŭ LIFKAŬ dum nokta ge-sido okupiĝis pri akcepto de eskimlingvaj afiksoj por difinitaj situacioj.

### **Junaĝe**

La IFEF-junularo progresive malabundas pro pliaĝiĝo. Oni povas bedaŭri tian evoluon, sed ĝi nur respegulas la situacion en plej multaj fervojaj administracioj. Almenaŭ ne mankas planoj kaj ideoj; oni rajtas supozi, ke la nova sekcestro Gérard Horn scias rimedojn por realigi ilin.

Referaĵoj pri danlandaj lernejoj sistemoj interesis ne nur junajn kongresanojn kaj iniciatis vigran, longedaŭran diskuton. Junulara vespero, tablotenis, invito al skisemajno en Maribor kaj kompreneble la tradicia piedpilkludo i. a. okupis la junajn gekolegojn. La pilkomaĉo vidigis eĉ esperigan rezulton: la DSB-teamo gajnis kun nur 4 je 1 goloj kontraŭ la nia.

### **Turisme**

En laŭdire usona maniero spertaj ĉiĉeronoj gvidis aŭtobuse tra Aarhus, montris modernajn loĝkvartalojn, universitaton, industrian haveninstalajojn, konstruaĵojn vidindajn kaj la malnovan urbon „Den Gamle By“, kiu ja estas muzea urbetu, tamen vivigata de loĝantoj, funkcia poŝtejo kaj laborantaj metiistoj. Okazaj pluvotorentoj en la paŭzoj zorgis pri akurata reveno al la aŭtobusoj.



Kiel unike bela tago memorindas la tut-taga ekskurso sur la lagoj de Silkeborg, tra jutlanda erikejo, trans la Malgrandan Belton al Middelfart. Tiuj belaĵoj de la burĝonanta naturo, la imponaj verkoj de la tekniko, blua ĉielo, amika societo, festena manĝo, gaja muziko, petola humoro, estis unu tuto, unu seninterrompa kompleto, unu ronda travivaĵo neforgesebla.

Aŭtobusekskurso tra la duoninsulo Mols montris idiliajn pejzaĝojn kaj urbetojn, kiel prenitajn el bildlibro aŭ kiel eksterlanda turisto imagas Danlandon. Ankaŭ cetere ĉirkaŭ Aarhus proponiĝis multaj logaj celoj por ekskursetoj. Bonan helpon donis la turismaj prospektoj en Esperanto pri Danlando entute kaj Aarhus speciale.

### Fine

La transdono de nova IFEF-flago al LKK Tarragona finis nian 25an kongreson. Kopenhago vokis ankoraŭ ducenton al postkongresa programo.

Kiel ni kutimiĝis al la fama dana biero, kaj, kun kreskanta ŝato al la afabla gastlando, iom post iom eĉ kun ĝuo trinkis ĝin, tiel facile ni certe amikiĝos kun la arde ruĝa vino ĉe la hispana marbordo mediteranea.

Aarhus ridetas, kiam nia tagmeza pramŝipo malproksimiĝas de la havenkajo. Marvojaĝo facile vekas nostalgiajn sentojn. Kaj Aarhus ridete salutas adiaŭon.

wbr

### Postkongreso en Kopenhago

Mevoj akompanis la postkongresanojn survoje de la ĉefstacidomo de Kopenhago al la proksima hotelŝipo Lorenzo, kiu

gastigis la plej multajn dum du eventoriĉaj tagoj. Komune kun lokaj esperantistoj oni festis posttagmeze ĝis meznokto en la varvagona kantino, kiu kontraŭ ĉia atenta estis plenplena de 200 gajaj gesamideanoj. La tabloj estis belege ornamitaj per floroj, kandeloj, prospektoj kaj donacoj. Aŭdiĝis afablaj salutvortoj. Aparta „ludonklo“ zorgis pri distaĵoj, kaj senlaca muzikisto transformis per siaj fajraj melodioj ĉiujn dancemulojn. Ne mirinde ke la disiro ne estis facila.

Rondveturado per kelkaj aŭtobusoj kondukis la sekvan tagon, 20. 5., multajn interesulojn tra la sunbrila metropolo. Sed honore al la piedirantoj estu menciata ankaŭ, ke unu grupo faris rondiradon. Eble ĝi vidis eĉ pli. Kopenhago demonstris sian belecon kaj ĉarmon per idiliaj kvartaloj, grandiozaj konstruaĵoj, multnombraj monumentoj, multkoloraj floroj ĉie, stratoj sen aŭtotrafiko, parado de la gardistoj antaŭ la reĝa palaco kaj amaso da scivolemaj gajaj turistoj. Kompreneble allogis ankaŭ la fama skulpturo de la marvirineto ĉe la nova haveno, kie majeste preterpasis marŝipoj.

Kiam vespere miloj da koloraj lampoj eklumis en la amuza parko Tivoli, ne mankis la postkongresanoj. Ili svarmis de unu karuselo al alia budo. Tie aŭdiĝis orkestra muziko, tie prezentiĝis danca aŭ pantomima spektaklo. Laciĝite per multnombraj impresoj oni serĉis trankvilan benkon aŭ trinkis kafon en unu el la restoracioj. Antaŭ noktomezo grandioza piretekniko finis ĉion.

Sinceran dankon al ĉiuj kunorganizintoj. Ni travivis belegajn tagojn en amika sfero. W. B.

### Du jubileoj de la IFEF-prezidanto

Kelkajn tagojn antaŭ la 25a, la jubilea kongreso de IFEF ties prezidanto Joachim Gießner el Herzberg (Harz) festis la 40-jaran jubileon kiel aktiva fervojisto. La lan de majo 1933 li komencis sian karieron kiel inspektoro-aspiranto en la distrikto de la fervoj-direkcio Dresden. Post trijara studado sekvis okupo en diversaj stacioj i. a. ankaŭ en la lima servo de la stacio Franzensbad situanta en la teritorio de Ĉeĥoslovakio. Pedagogiajn spertojn Gießner akiris kiel instruisto por la funkcia servo en kaj ĉirkaŭ Dresden. Dum la milito li laboris en respondecaj oficoj de

la funkcia servo en Francio kaj Polujo. Post 1945 li transprenis similan oficon en la Supra Funkcia Stabo Okcidenta (Oberbetriebsleitung West) en Bielefeld. Depost 1954 lia intereso preferis la staciustran deĵoron en Braunschweig, Elze kaj — ekde 1967 — Herzberg (Harz). Tie, en la direkta fervoja medio, la staciestro Gießner estas estimata de fervojaj kaj lokaj instancoj kaj ŝatata de siaj kolegoj. Ŝajnas ke li establiĝis tie, ĉar la beleco de la kuraĉloko Herzberg instigis lin konstrui propran domon. Al ni gekolegoj, aktivaj kaj emeritaj, restas la sincera deziro, ke nia jubilanto pasigu sane an-



kaŭ la sekvajn jarojn en sukcesplena agado.

Sed estas menciinda ankaŭ alia jubileo, kiu forte koncernas Esperanton. Antaŭ 20 jaroj s-ro Gießner estas destinita flanko de la ĉefestraro en la Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo (BSW) kiel komisiito por Esperanto. Sinsekve li estis redaktoro, sekretario kaj la prezidanto de GEFA. Li transprenis kaj plenumis multnombrajn laborojn en la intereso de la Germana Esperanta Fervojista Asocio, kiu kreskis konsiderinde laŭ nombro, prestiĝo kaj aktiveco. Interne de la Sociala Organizo la relative malmultaj GEFA-anoj estas alte respektataj. La reklama kaj horara oficejoj de la Germana Federacia Fervojo eluzis la servojn de GEFA. La sindikatoj agnoskas la laŭdindan laboron de la esperantistaj fervojistoj. La kombino de pluraj oficoj alportis kroman amasan laboron, precipe post la elekto de Gießner kiel prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) en 1968. Tiu nuna periodo estas markata per multnombraj iniciativoj sur faka kaj internacia tereno.

La Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Internacia Federacio de Kulturaranĝantaj Fervojistoj (FIAIC), kun kiuj ekzistas modelaj interligoj, respektas la sukcesojn. Nia jubilanto tamen restas ĉiam sur la tereno de la realeco, bone pritaksante siajn proprajn eblojn kaj tiujn de siaj kunlaborantoj. Tia viro, kiu krom sia abunda organiza kaj — ne forgesinde — profesia laboro trovas ankoraŭ tempon kaj energion por traduki kanconojn kaj poemojn, gvidi kursojn kaj komisionojn, meritas niajn elkorajn dankojn kaj gratulojn okaze de tiuj du jubileoj. Ĉiuj niaj bondeziroj akompanas la pluan vivovojojn de nia GEFA- kaj IFEF-prezidanto Joachim Gießner. W. B.

### Jubileo Gießner

Nome de ĉiuj GEFA-membroj la sekretariino estis la unuan de majo en Herzberg, transdonante al la jubilanto florojn, donacojn kaj multajn salutojn.

La BSW-ĉefestraro dediĉis al S-ro Gießner por longjara aktivado valoran mondmapon.

### La tri filoj —

de Leo N. Tolstoj

Tri virinoj alportis akvon de la puto. Proksime de ili sidis maljunulo sur benko kaj aŭskultis, kiam la virinoj laŭdis iliajn filojn. „Mia filo“ diris la unua „estas tiel lerta, ke li lasis malantaŭ si ĉiujn aliajn...“.

„Mia filo“ diris la dua „kantas tiel bele kiel najtingalo! Ekzistas neniu, kiu havas tiel belan voĉon kiel li.“

„Kaj kial vi ne laŭdas vian filon?, ili demandis la trian, ĉar ŝi silentis. „Mi havas nenion pro kio mi povus laŭdi lin“ ŝi respondis. „Mia filo estas tute normala knabo. Li ne havas ion specialan, nek sur nek en si...“.

La tri virinoj plenigis siajn sitelojn kaj hejmen iris. La siteloj estis pezaj kaj la tro uzitaj manoj malfortaj. Krome doloris iliaj dorsoj. Pro tio ili iomete ripozis. La

maljunulo malrapide sekvis ilin. Renkonte venis tri knaboj. La unua starigis sin sur la manoj kaj radformis unu post la alia — kaj la virinoj ege admiris lin: „Kia ajn lerta knabo“. La dua bubo kantis bele kiel najtingalo kaj la virinoj emocie aŭskultis plenplenaj da admiro.

La tria knabo intertempe kuris al sia patrino, prenis la plenajn sitelojn kaj hejmenportis ilin. La virinoj demandis la maljunulon: „Nu, kion vi diras pri niaj filoj?“

„Kie estas viaj filoj?“ mirigite demandis la blankharulo. „Mi vidis nur unu veran filon.“

Tradukis: E. Kruse

### Internacia literatura konkurso

organizas la literatura rondon „La Patrolo“ en la kadro de la 44a Itala Esperanto-

### Akuratec-rekordo

En ĉi-jara januaro 91 procentoj de ĉiuj TEE-, IC- kaj aliaj rapidtrajnoj atingis siajn celojn akurate aŭ kun nur sensignifa malfruo. Sep procentoj de la trajnoj el longdistanca trafiko alvenis inter ses kaj dekkvin minutojn pli malfrue, nur du procentoj malfruiĝis je pli ol kvaronhoron. Tiuj lastaj estis preskaŭ ekskluzive trajnoj el eksterlando, kiuj jam malfruiĝintaj alvenis ĉe la limo. En la regiona kaj kurdistanca trafiko la akurateco atingis eĉ 96 procentojn. La ceteraj kvar procentoj prezentas tardiĝojn inter ses kaj dekkvin minutoj. Pli grandaj malfruiĝoj en la kurdistanca trafiko preskaŭ ne okazis.

Kongreso en Trento en Septembro 1973. Informojn ĉe: Patrolokonkurso 1973, via Pantano, 17, I-20122 Milano.



## Mitteilungen des Vorstandes

Vorstand, Bezirksbeauftragte und Beauftragte für Sonderaufgaben trafen sich wie im Vorjahr zu ihrer Frühjahrs-Arbeitsbesprechung am 31. 3. 1973, dieses Mal in Würzburg.

Ausführlich wurde die Tagesordnung des inzwischen hinter uns liegenden IFEF-Jubiläumskongresses in Aarhus behandelt. Bba Herlitze berichtete eingehend über den Stand der Vorbereitungen zur diesjährigen Jahresversammlung vom 5.-7. 10. in Koblenz. Die Auswertung der Jahresberichte (leider nicht aller BD) ergab eine zufriedenstellende Beteiligung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten an nationalen und internationalen Begegnungen: Lugano 89, Portland 2, Kuopio 2, Clervaux 82, Braunschweig 30, Aarhus 502 und sonstige internationale Veranstaltungen 10 Teilnehmer.

Wie bereits bekanntgegeben, wird die Zentralbücherei weiterhin von unserem Kollegen Rösemann, BD Hannover, Bf 34; Basa 949/2378, betreut. Durch Neuzugänge in den letzten Jahren hat sich die Zahl der wertvollen Esperanto-Bücher vermehrt. Das Bestandsverzeichnis soll neu erstellt und den Bezirksbeauftragten übersandt werden, die ihren Interessenten Auskunft erteilen. Es wird gebeten, recht rege von dieser Einrichtung Gebrauch zu machen.

Anschriftenänderung der Bba und Sonderbeauftragten bitten wir rechtzeitig dem Schriftleiter bekanntzugeben. Ebenfalls werden die Mitglieder gebeten, Veränderungen ihrem zuständigen Bba mitzuteilen.

Plakate „Esperanto erstklassig“, die sich zur An-

kündigung von Veranstaltungen vorzüglich eignen, sind noch in ausreichender Zahl beim Beauftragten für Werbung und Information vorhanden und können dort angefordert werden. Die Sonderausgaben „Direkter Draht“ und Bulteno 3/1973 liegen bei den Bba auf Abruf bereit. Zur Schnellinformation, auch kurzfristigen Ankündigung von Veranstaltungen, ist „Pilo-Press“ besonders geeignet. Der Bezug wird empfohlen.

Das Rundschreiben an die ehemaligen Mitarbeiter der DB ist von 45 Esperanto-Veteranen beantwortet worden. Das Altentreffen wird in Hamm i. W. und Würzburg durchgeführt. Die Einzuladenden sind durch die GEFA-Sekretärin unterrichtet worden.

## Jahresversammlung in Koblenz

Diesem Bulteno liegen bereits die Zimmerbestellkarten bei, die bei beabsichtigter Teilnahme ausgefüllt und direkt an die vorgeschriebene Anschrift bis zum 1. September 1973 zurückgesandt werden müssen. Spätere Bestellungen werden im Rahmen der vorhandenen Möglichkeiten angenommen und bearbeitet. Für die Reservierung nach dem vorgeschriebenen Zeitpunkt kann jedoch keine Garantie übernommen werden, da wegen der zahlreichen Weinfeste an Rhein und Mosel im Oktober starke Nachfrage nach Übernachtungsmöglichkeiten auftreten.

Nähere Einzelheiten und eine Übersicht über die Veranstaltungsfolge wollen Sie dem Bulteno 5/73 entnehmen, dem auch ein Anmeldevordruck beigelegt ist, den Sie bitte bis Mitte

September 1973 einsenden wollen.

Nach Eingang Ihrer Zimmerbestellung erhalten Sie von der Stadtverwaltung Koblenz eine Bestätigung und die Bekanntgabe des Hotels, in welchem die Reservierung vorgenommen wurde.

## Aus den Gruppen

### Wuppertal

Im Rahmen der BSW-Bezirksvertreterversammlung am 6. 6. 1973 boten die Gruppen der Abteilung Kulturelle Betreuung den Gästen einen Überblick über das Freizeitschaffen ihrer Mitglieder. Die vom Kollegen Jentsch aufgebaute Esperanto-Werbeshow fand wohlwollende Beachtung und wurde während der Sitzungspausen von zahlreichen Interessenten in Augenschein genommen. Bba Graß vermittelte den Zuhörern einen Überblick über die Arbeit und Ziele der Eisenbahner-Esperantisten und die Anwendungsmöglichkeiten der Internationalen Sprache. Die Vorsitzenden der Ortsverbände wurden gebeten bei den BSW-Spendern auf unsere Informations- und Unterrichtsangebote aufmerksam zu machen. Unser Sonderbulteno Nr. 2/1973 „Informationen“ wurde an alle Teilnehmer verteilt und fand reges Interesse.

### Sanĝo de GEFA-adresaro

Apartaj komisiitoj  
Ritterspach (nova deĵortelefono): 955/3680

### Rimarko

GEFA-jarkunveno okazos de la 5a ĝis 7a de Oktobro 1973 en Koblenz. Informoj, provizora programo kaj aliĝilo sekvos en la venonta Bulteno.



## Kunveno en Stuttgart

La 7an de aprilo Siegfried Krüger, distriktkomisiito por la regiono Stuttgart, invitis siajn membrojn por jarkunveno 1973. Ĉar estas malfacile havi dum sabato por niaj celoj taŭgan kaj ne tro multekostan gast-ejon, li ne hezitis fari eksperimenton. La de li elektita „Wohnheim“ apud la norda stacio Stuttgart montriĝis tre taŭga loko, ĉar ĉiuj enloĝantoj de ĉi tiu domo devis preterpasi en la vestiblo eĉ plurfoje dumtage la GEFA-ekspozicion, kiun aranĝis kaj vartis nia eksperto Kurt Jentsch. Do, ne mirige, ke ĝi altiris kelkajn junulojn, kiuj ricevis bonajn informojn kaj materialon. Ankaŭ ĵurnalisto de Stuttgarter Zeitung poste dediĉis artikolon al tiu ekspozicio. La gemastroj Siebler afable disponigis al ni la salonon kaj ĉiuj ĉeestantoj havis la avantaĝon, per malmultaj elspezoj pasigi agrablan tagon.

La vojo al la kunveno estis bone signita per sagoj kaj ŝildoj, kaj 30 personoj facile trovis ĝin. La naturscienca muzeo en la Kastelo Rosenstein estis nia unua celo. La disponebla tempo ne sufiĉis por detala informado, sed ni ricevis bonan superrigardon pri la intereso tie ekspoziciita materialo. Eĉ vekigis la deziro refoje viziti ĝin. Post nia reveno bonodoris la kafo en la Wohnheim. Ĉe komuna tablo la paroloj inter kafo kaj kuko kreis viglan atmosferon, la ĝusta antaŭtakto por la bonvensalutoj kaj la raporto de s-ro Krüger. D-ro Breuninger, gasto el Ulm, poste prezentis dia-prelegon pri vojaĝo al Finnlando, kiun li entreprenis lastare kun sia filino. La prelego kaj la bildoj

estis ege interesaj, nur bedaŭrinde tro ampleksaj. Des pli la ĉeestantoj ĝojis aŭdi viglan muzikon de iama kolego Walberg, kiu eĉ instigis al dancado.

Generale la kunveno bone sukcesis. Al s-ro Krüger koran dankon pro lia iniciativo kaj lia kuraĝo. Dankon ankaŭ al ĉiuj helpantoj. Estis ĝojo por mi, esti en ilia rondo.

sekretariino de GEFA/IFEF

## Nova distrikt-komisiito en München

Mi aŭdis pri Esperanto jam tre frue, nome antaŭ la jaro 1939 flanke de pli maljuna kolego, kiu rakontis al mi



Josef Weidacher

pri la neŭtrale Internacia Lingvo. La kolego rakontis entuziasme, tamen li mem ne estis esperantisto. La duan fojon mi konatiĝis kun Esperanto tuthazarde dum restado en alpa dometo proksime de Bad Reichenhall. Fervojista geedzparo el Heidelberg feriiis tie kaj parolis favore pri Esperanto. Post la Universala-Kongreso 1951 en München mi lernis la Internacian Lingvon en mia laborejo.

Post la kurso mi volis pruvi miajn spertojn kaj partoprenis la IFEF-kongreson 1952 en Lindaŭ. Kvankam mi estis nur du tagojn en Lindaŭ, mi estis pli ol kontenta pri la rezulto de mia okmonata lernado kaj kun novaj instigoj mi daŭrigis la lernadon. Mi aliĝis al loka GEFA-grupo. La unuajn eksterlandajn spertojn mi kolektis okaze de internacia feriosemajno 1953 en la kastelo Gresillon, Baugé/Franco. Depost tiu tempo multaj eksterlandaj vojaĝoj al kongresoj, feriosemajnoj kaj personaj vizitoj respektive gastigado de Esperanto-amikoj el multaj eŭropaj landoj abunde valorigis mian ĝisnunan vivon.

Kiel posteulo de nia kolego Hermann Schmid mi transprenis la taskon de komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto München.

## Renkontejoj

La fervojista Esperantogrupa München (Munkeno) kunvenas ĉiun mardon de la 19a ĝis la 22a horo en la hotelo „Europäischer Hof“, vid-al-vide la ĉefstacidomo (sudeliro) en la unua etaĝo. Gastoj estas bonvenaj.

## Pli ol 6.000 personoj enketitaj en Germanujo

Laŭ enketo de Germana Esperanto-Junularo, kiu tuŝis 6.320 personojn, 90% scias, kio estas Esperanto. Ke dua komuna lingvo estus solvo de la lingva problemo kredis 87%. Entute 81% pledis por la konkordo de Esperanto en la lernejojn. La instruistoj des malpli estis favoraj al Esperanto, en ju pli altgranda lernejo ili instruas. Al solvo per unu nacia lingvo kredas 2,5%, al solvo per pluraj naciaj lingvoj: 6%.



## Prelegvojaĝo tra Finnlando

La Estrarano de UEA, D-ro Werner Bormann (Hamburgo) faris kun sia edzino unusemajnan rondvojaĝon tra Finnlando, meze de Februaro. La ĉefcelo estis partopreni al la ĉijara finna Esperantokongreso kaj tie festparoli. Survoje ili vizitis kvar gravajn urbojn: Turku, Tampere, Jyväskylä kaj Kuopio. En ĉiuj kvar urboj D-ro Bormann donis intervjuaĵojn al la gazetoj kaj ankaŭ prelegis germanlingve en la lingva instituto de Tampere, en la Universitato de Jyväskylä kaj en la german-finna societo en Kuopio. S-ino Bormann prelegis en Esperanto-klubo pri la urboplanado en tiu parto de Hamburgo, kie ŝi kunrespondecas kiel deputino. (Pilo)

## U Thant sciis nenion

Okaze de seminario ĉe la Instituto por Internaciaj Aferoj en Ĉikaĝo, S-ro R. Kent Jones hazarde renkontis la eks-ĝeneralan sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, s-ron U Thant.

Demandita pri la Peticio por Esperanto de 1966, U Thant respondis simple, sincere kaj ĝentile, ke li neniam aŭdis pri iu ajn peto por Esperanto.

## Instrukomisiono pri Esperanto en Hamburgo

La konsilantaro de la fakgrupo lingvistiko en la Universitato de Hamburgo favore decidis pri la propono de D-ro W. Bormann reaktualigi la instrukomisionon pri Esperanto. Denove li estas nun instrukomisiito (germane: Lehrbeauftragter) por Esperanto en la fakgrupo lingvistiko (germane: Fachbereich Sprachwissenschaften) kaj tial apartenas al la instruistaro de la Universitato de Hamburgo. La Esperanto-informado kaj -lingvo-kurso komenciĝis meze de Aprilo. el: Heroldo de Esperanto

## Esperanto-veteranoj

Maljuna esperantisto en la distrikto Essen estas

### Albert Rehwinkel

el 46 Dortmund-Westrich, Meisenweg 35.

Unufoje en la jaro 1932 la veterano aŭdis ion pri Esperanto. La intereso estis tiom granda, ke li vizitis tuj kurson por komencantoj en la Herman-lernejo en Dortmund, poste en la sekvonta jaro li membriĝis al SAT.

Kiam en la jaro 1933 komenciĝis la „Miljara-Reg-



Albert Rehwinkel

no“, lia tuta Esperanto-literaturo estis konfiskita, lia libereco estis danĝerigata. Nature dum tiu tempo ĉio estis pasinta.

Post la milito li partoprenis regule la lokajn aranĝojn en Dortmund. Kelkfoje li varbis fervojistojn por Esperanto. Ĝis hodiaŭ li fervore legas gazetojn kaj literaturon en la Internacia Lingvo.

La 25an de Aprilo 1973 li festis sian 75an naskiĝtagon. GEFA gratulas kore kaj deziras kontentigan sanstaton.

Redaktfino por n-ro 5/1973 estas la 5. 8. 1973

## Esperanto-Universitato

Preskaŭ 400 personoj el 14 landoj partoprenis 1972 la jubilean X-an Someran Esperanto-Universitaton en Gyula (Hungarujo). Diversaj artobjektoj, variaj amuzeblecoj, strand-, kuraĉ-kaj termbanejoj donis plezuron, amuziĝon kaj ripozon al la vizitantoj. Dum sep tagoj la aranĝantoj organizis universitatnivelan programon por la partoprenantoj.

La 9an de aprilo 1973 edziniĝis nia vigla kaj humorplena skiinstruisto Frank Gießner, konata el la skisemajno 1972 en Spitzingsee. Ni kore gratulas al Frank kaj al sia ĉarma edzino Ulrike kaj deziras al ili harmonian komunan vivon.

## BEFA Esperanto Semajnfino

La Belga Esperanto-Fervojista Asocio organizos sian jarkunsidon 1973 en la monaĥinejo de Firchemont situata meze en la batalkampare de Waterloo.

Se vi ŝatas historiplanan kaj agrablan longigitan semajnfinojn venu al Waterloo la 29 kaj 30an de Septembro kaj vizitu kun ni la 1an de oktobro i. a. la historiajn kaj naturplenan lokon Mariemont.

Eblos pli longa restado.

Krom la interesaj prelegoj, vizitoj al muzeoj kaj film-prezentadoj, ekspozicioj, Esperanto-ekzamenoj kaj diplomigoj, ĥorkantoj kaj muzikistaro-fervojaj, vi certe ĝuos napoleonan etoson en kaj ekster la monaĥinejo.

Programo kaj aliĝiloj akireblaj kaj mendeblaj ĝis la 15an de septembro ĉe:

**BELGA ESPERANTO  
FERVOJISTA ASOCIO  
stacio  
B 1030 ETTERBEEK**



## Fervojnovaĵo

En la februara numero de „Le Monde diplomatique“ aperis kvar artikoloj pri la eŭropaj fervojoj. Du estraranoj de la Internacia Fervoja Unuiĝo, la ĝenerala sekretario Bernard de Fontgalland kaj la estro de eksekutivaj aferoj P. Ballet, raportis pri la evoluo kaj la organizo de la internaciaj fervojsistemoj. En alia artikolo Jacques de Barrin priskribis la aperadon de rapidegaj trajnoj — la TEE kaj interurbaj trajnoj.

Sub la titolo „Dua aĝo“ s-ro de Fontgalland konstatis, ke sur 250 000 da relkilometroj veturas du milionoj da vagonoj en Eŭropo. Dum la jaro 1971 preskaŭ tri milionoj da fervojistoj „produktis“ pli ol 300 miliardojn da vetur-kilometroj. Kaj malgraŭ malcerteco kaj pesimismo de multaj la evoluo de la eŭropa fervoja sistemo daŭras laŭ-regule.

Li opinias, ke la pligraviĝo de aŭtomobiloj kaj aviadiloj ne malhelpas la evoluon de la fervojoj kiel kredis antaŭe aliaj. La aŭtomatigo de la fervojo kondukis jam al la konsekvenco, ke la fervojo prezentas la eblecon transporti pli racie. La studoj de multaj eŭropaj registaroj konfirmis la konkludojn de la japanoj kaj de la amerikanoj, ke fervoja linio laŭ kapacito estas pli profita ol aŭtostrato egallonga.

Flughaveno bezonas la spacon de moderna urbo kaj transportan reton eksteran. Krome la kostoj de evoluigo de fervoja ilaro restas sub tiu de ekipaĵo aviadila. En sociala kadro la fervojo ebligas protekton kontraŭ polucio de la naturo kaj alta akcidentkvoto — aspektoj apenaŭ atingeblaj de aŭto kaj aviadilo.

La jam atingita rapideco de 300 km/h ne prezentas al ni limon, sed restas la plej rapida metodo de transportado surtera. La gasa movsistemo aliflanke ne malpurigas la naturon, kaj la bruo ne egalas al tiu de supersonaj aviadiloj.

La vartransporto eblas per 60-tunaj vagonoj kaj ĝuas favoron en la branĉo de grandaj pezajoj. Aliflanke la estonteco de la pakaj-transporto restos malcerta, opinias s-ro de Fontgalland, pro la altaj prezoj. Rilate al la laboristaro la eŭropaj fervojoj faris du paŝojn:

unuflanke oni planas la aŭtomatigon, kiu devus esti atingata ĝis 1981; aliflanke oni enkondukos la kibernetikon por la daŭra regulado de la trafiko en ĉiuj fazoj. La loka trafiko jam estas definitive perdita. Tio postulas la fermon de malgrandaj stacioj kaj eĉ de duarangaj linioj. La interurba trafiko troviĝas kontraŭe en favora pozicio, ĉar la stacioj situas enmeze de grandaj urboj eŭropaj. La aviadiloj suferas pro problemoj per la eksterurbaj flughavenoj kaj la tempo bezonata por atingi la flugajn rapidecojn. La urbego troviĝas ne malofte nur pli ol kelkajn kilometrojn unu de la alia.

Laŭ la verkisto la decido de nia jarcento estas politika: Ĉu oni rajtos rezervi la altajn rapidecojn al nur malgranda parto de la homaro? Laŭ lia opinio necesas specialigo de la fervojoj. Nur per tia progreso la interurbaj linioj ebligos do la tute servon al ĉiuj. Ankaŭ vetuŭropa kunlaboro necesas. Sukcesplena ekzemplo estas la tunelo sub la Manika Kanalo.

La standardigo ĉe la eŭropa fervojo ĝis nun ne atingis

tiun de la aŭtomobiloj kaj la aviadiloj.

Li subtenas komunajn aĉetojn, sed mencias la brem-sigon de diversaj industriaj interesoj. Malgraŭ la jam ekzistantaj intereŭropaj firmaoj (ekz. Interfrigo. Intercontainer, Eŭropabus, Eŭrofirma ktp.) la problemoj inter la 26 malegalaj fervojretoj de Eŭropo daŭras. Sed li konkludas, ke la eblecoj de kunlaboro aspektas bone.

Ekstrakte tradukita de Robert Kvaŝnak

## Pli da vojaĝantoj al Berlin

La fervoja pasaĝertrafiko inter FRG, GDR kaj okcidenta Berlin en la pasintaj kvar jaroj permanente kreskis. Meznombre en 1969 ĉiutage transiris ambaŭdirekte la limon sume 12 780 pasaĝeroj, en la sekvinta jaro jam 14 056, en 1971 precise 14 731 kaj en 1972 16 334 pasaĝeroj. La nombro da pasaĝeroj de 1971 al 1972 kreskis sume je 601 571 aŭ proksimume je 11 procentoj.

La plej multe frekventata limpasejo estis Helmstedt-Marienborn kun kresko de 15,4 procentoj, sekvas Büchen - Schwanheide kun 14,6 procentoj. La ceteraj anoncis inter 8,1 ka 10,4 procentojn. Tiu eksterordinara kresko estas precipe sekvo de ampleksiĝinta Berlin-trafiko.

## Lingva problemo

Afiŝo pendas je soleca franca hotelo:

„Ĉi-tie oni parolas 6 lingvojn!“ Eksterlandano, kiu nur tre malfacile kapablis solvi la lingvan problemon kun la hotelestro, demandis tiun:

„Kiu do parolas la ses lingvojn ???!“

La respondo de la estro: „Miaj gastoj!“



## Esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en 1973

32. **8-14.VII. Päijänne, Finnlando/Suomio:** Internacia tendaro „Parolu kaj aŭskultu“ (Y. Suontausta, SF-17 300 Vääksy)
33. **8-14.VII. Lančov, Ĉeĥoslovakio:** 21-a Somera Esperanto-Tendaro, kun seminario por E-instruistoj kaj postaj E-kursoj (Th. Kilian, Prični 3, CS-674 01 Trebič)
34. **8-22.VII. Dudince, Ĉeĥoslovakio:** Somera Esperanto-Lernejo (E. Vana, CS-962 71 Dudince okr. Zvolen)
35. **12-22.VII. Bulgarujo:** „Sano kaj ripozo“ — feriado por esperantistoj organizata de „Balkanturist“ (Esperanto, Pl. Lenin 1, Sofia C)
36. **15-28.VII. Tatra-regiono, Ĉeĥoslovakio:** Somera Esperanto-Lernejo (Eklubo ĉe Muzeo J. Kral, CS-031 01 Lipovsky Mikulaš)
37. **18-20 kaj 21-27.VII. Maribor, Jugoslavio:** respektive VII-a Kunordiga Konferenco (grupo I) por enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj Internacia Instruista Konferenco de ILEI (L. Prebil, Tomanova ul. 19, YU-62000 Maribor)
38. **18-27.VII. Abaliget, Hungarujo:** 6-a Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN Pf. 2, H-7601 Pécs)
39. **21-27.VII. Sarajevo, Jugoslavio:** 29-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (V. Pelagica 8/I, YU-71000 Sarajevo)
40. **21-28.VII. Banska Bystrica, Ĉeĥoslovakio:** Kultura Turisma Esperantista Semajno en Slovakio (J. Antostik, Horna ul. 33, CS-974 00 Banska Bystrica)
41. **22-29.VII. Elsinoro (Helsingör), Danlando:** Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj (L. Friis, Ingemansvej 9, DK 8230 Abyhøj)
42. **22.VII-9.IX. Grésillon.** Internaciaj Semajnoj, Studsemajnoj, ktp.
43. **24-27.VII. Ljubljana, Jugoslavio:** Oficiala Antaŭkongreso (E-societo, Tavčarjeva 2, YU-61001 Ljubljana)
44. **24-28.VII. Beogrado, Jugoslavio:** 41-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (V. Stefanović, Koste Taušanovića 8, YU-11050 Beograd)
45. **28.VII.-4.VIII. Beogrado:** 58-a Universala Kongreso de Esperanto (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam NL-3002)
46. **28.VII.-4.VIII. Beogrado:** 13-a Internacia Infana Kongreseto en „Pionira Urbo“
47. **28.VII.-4.VIII. Toronto, Kanada:** 46-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT, Av. Gambetta 67, F-75020 Paris)
48. **29.VII.-11.VIII. Košice, Ĉeĥoslovakio:** Somera Esperanto-Lernejo (E-Klubo, Rooseveltova 5, CS-040 00 Košice)
49. **5-12.VIII. Krommenie, Nederlando:** 19-a Internacia Esperanto-Feriosemajno (S-ino A. v. d. Meulen, Popelstraße 13, Krommenie)
50. **5-12.VIII. Ateno, Grekujo:** Oficiala Postkongreso (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam NL-3002)
51. **6-13.VIII. Primošteno, Jugoslavio:** Postkongresa Feriado (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
52. **19-26.VIII. Churanov (monto), Ĉeĥoslovakio:** esperantista feriado (L. Krivánek, Zborovska 1332, CS-397 01 Pisek)
53. **19-26.VIII. Podebrady, Ĉeĥoslovakio:** 6-a Esperantista Sak-Festivalo (L. Fiala, Fügnerova 28/18, CS-290 01 Podebrady)
54. **2-8.IX. Füringen (monto), Svislando:** 14-a Eŭropa Ferio-Semajno (E. Glätti, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg)
55. **8-9.IX. Dudince, Ĉeĥoslovakio:** Tradicia Amika Renkontiĝo Esperantista (adreso kiel sub 34)
56. **10.IX. Plovdiv, Bulgarujo:** Esperanto-renkontiĝo en la kadro de la Internacia Specimena Foiro (P.k. 184, Plovdiv)
57. **16-26.IX. Pamporovo, Bulgarujo:** Ora Esperanto-Feriado (Distr. E-Kom., Smoljan)
58. **16-29.IX. Miedzygórze, Pollando:** IX-Internacia Esperantista Feriado „La Ora Pola Pola Aŭtuno“ (PEA, Pk. 16, PL-50-952 Wrocław 17)
59. **26-30.IX. Budapeŝto, Hungarujo:** 2-a Vinrikolta Semajnfino
60. **1-7.X. Zagreb-Sisak-Karlovac, Jugoslavio:** Pupteatra Internacia Festivalo
61. **1-7.X. Zagreb:** Internacia renkontiĝo de infanoj (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
62. **28.XII.-2.I.74. Budapeŝto:** 3-a Vintra Esperantista-Ferio (HEA, Kenyermezo 6, Budapest VIII)  
el: Heroldo

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.